der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

25. Jahrgang | Nr. 154 (2/1989) | ISSN 001 4-0619 | 30 Pf

Mesaĝo de la prezidanto de UEA

DUE . . .

Ĝuste kiel ni esperis, la jaro 1988 montriĝis jaro de planado — jaro en kiu ni analizis la progreson de UEA kaj de la Esperanto-movado, kaj faris rekomendojn por la estonteco. Nova Strategia Plano estis principe aprobita de la Komitato de UEA kaj transdonita al la membraro (en la oktobra revuo Esperanto) por ties reago kaj komentoj. Surbaze de tiuj rekomendoj, la Plano estos modifita kaj pli precize fokusita.

Tiu Plano difinas tri ĉefajn prioritatojn por la komenco de la dua jarcento de Esperanto. Iom taúge, iliaj komencliteroj formas la vorton DUE. Temas pri:

Disvastigo de Esperanto;
Utiligo de Esperanto;
Edukado al tutmonda konscio.

Se oni ne lernos Esperanton, la kulturo kaj socio de Esperanto ne pluvivos. Ni salutu kaj gratulu tiujn, kiuj mem instruas la lingvon, profesie aú amatore, aú kiuj pretigas lernilojn aú organizas kursojn. Ni ne dediĉas sufiĉan atenton al tiuj plej bazaj, plej esencaj laborantoj en nia movado. Ni ankaú ne mem dediĉas sufiĉan atenton al propra plibonigo de nia lingvoscio.

En rilata tereno, tiuj, kiuj informadas pri Esperanto al la ekstera publiko ludas preskaú egale esencan rolon. Kune kun niaj instruistoj, ili konsistigas la disvastigantojn de Esperanto.

La utiligantoj de Esperanto estas tiuj, kiuj celas praktike apliki Esperanton — en scienco kaj tekniko, kaj en aliaj sferoj de la homa vivo. Ili estas tiuj, kiuj verkas kaj arte prezentas en Esperanto. Ili estas ankaú tiuj, kiuj helpas nin pli bone uzi Esperanton, montrante al ni novajn vojojn al ĝia praktika utiligo aú plifortigante niajn organizaĵojn kaj instituciojn.

Sed por kio lerni Esperanton, pro kio utiligi ĝin? Ĉefe temas pri tio, ke ni opinias ke pli vasta utiligo de Esperanto igus la mondon pli kapabla trakti siajn aferojn, pli riĉa spirite, pli tolerema kaj komprenema. Nia tria tasko do — post lernado kaj utiligado — estas uzi ĝin por fariĝi pli bonaj civitanoj de la mondo, kaj por helpi la homaron solvi siajn problemojn pace, harmonie kaj kompreneme.

Disvastigo, Utiligo, Edukado al tutmonda konscio — jen, do, tri principoj, tri ideoj, kiujn ni kiel esperantistoj povus bele apliki en la Nova Jaro 1989. En la dua jarcento, DUE fariĝu nia devizo.

Humphrey Tonkin

Rekomendoj el Ahrenshoop '88

36 aktivaj motadanoj el 12 landoj kunvenis en la Internacia Seminario „Sojle al la dua jarcento — lingvo kaj parolantaro — Kion konservi, kion ŝanĝi?", 5-a ĝis 10-a decembro, 1988 en Ahrenshoop, GDR, okazinta sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio kaj post aŭskultado al prelegoj kaj arda diskutado, **konstatis,**

1) ke kvankam la nombro de seminarianoj ne estis granda, ĉi tie tamen estis reprezentitaj gravaj movadorganoj kiel la Akademio de Esperanto (AdE), UEA, TEJO, ILEI, TEC kaj unuopaj LA kun siaj funkciuloj;

2) ke estis malofta okazo senpere konatiĝi kun la gvidantaj de AdE kaj interŝanĝi opiniojn pri la rolo de AdE en la dua jarcento;

3) ke estis aparte bonvena la partopreno de la reprezentanto de la Internacia Informcento pri Terminologio „Infoterm" (Vieno, Aústrio);

4) ke 20 prelegoj pri diversaj temoj estis ĉiuj interesaj kaj trafe referitaj konforme al la celo de la Seminario, kies titolojn ni prezentas ĉisube, por ke eventuale la interesitoj sin turnu al la seminaria organizanto pri livero de unuopaj prelegtekstoj;

5) ke la pritraktitaj temoj estis tre variaj kaj ampleksaj, kaj ne eblis profundigi la diskutadon pro manko de tempo; kaj tial,

ni listigas ĉi-sube la bonaj kaj konsiderindajn ideojn kaj sugestojn levitajn el la prelegoj kaj diskutado laú 5 kategorioj, kaj rekomendas al ĉiuj celkonsciaj movadanoj, ĉu individue, ĉu kolektive, prinoti kaj utiligi ilin por plua traktado en sia medio:

1. Kategorio I (lingvistikaj demandoj):

1.1. AdE pli ol ĝis nun vivu en sia publiko kaj publikigu pri si. Por atingi tion oni trovu kadrojn, ene de kiuj AdE prezentu siajn rezultojn, ekz. sendante ilin al influhavaj revuoj tra la mondo, kaj utiligante la E-ajn radio-elsendojn, tiel ke la akademianoj montru sin en la publiko kaj sian reputacion.

1.2. Oni okazigu seminarion pri leksikografiaj problemoj por ebligi sperto-interŝanĝon inter verkistoj de la ekzistantaj bonaj mezgrandaj vortaroj kaj gramatikaj libroj, kun la celo verki kaj eldoni normigan vortaron kaj gramatikan libron, uzeblan internacie.

1.3. Okazu aktiva kunlaborado de la akademianoj kaj de aliaj esperantologoj kun neesperantistaj instancoj kiel „Infoterm", universitataj esplorcentroj kaj aliaj.

1.4. Plivigliĝu la esplorado pri la propedeŭtika valoro de Esperanto.

1.5. La rolo de TEC estu pli vaste diskonigata.

1.6. AdE preparu sin por esti jura personeco, por ke ĝi tiel povu ricevi donacojn senimposte.

2. Kategorio II (Strukturaj kaj movadologiaj demandoj):

2.1. Oni utiligu la materialojn de la movadologia simpozio en Roterdamo (dum 73-a UK) kaj de la seminario en Szeged (Hungario) „Esperanto en la dua jarcento".

2.2. Oni daúrigu la organizadon de strategie gravaj seminarioj kun pli monografia enhava profilo.

2.3. Por efike akumuli kaj funkciigi la laborojn de diversaj Esperantocentroj tra la mondo, UEA prenu sur sin la kunordigan rolon de la laboro de tiuj centroj.

2.4. UEA estu konsiderata kiel servocentro por la tutmonda esperantista komunumaro, tiel ke malaperu la malkontento kaj izoliteco de multaj esperantistoj. Samcele, UEA klopodu disdividi la taskaron de esperantistoj vaste tra la mondo, kunlabore kun LA kaj FA, por akurataj administraj servoj kaj interna kaj ekstera informado.

2.5. Transpaga problemo estas grava bremso de internacia kunlaborado, kaj tial UEA klopodu trovi taŭgan solvon, ekz. per kolektado de netranspagipovaj valutoj por komuna eldono de libroj k. s.

3. Kategorio III (Priservaj demandoj en la Esperanto-movado):

3.1. Oni plialtigu la nivelon de servoj al la membroj (akurateco), ĉar nekontentigaj servoj estas ofte la ĉefa kaŭzo de foriro de la membroj kaj perdo de gravaj laborfortoj.

3.2. Bibliotekoj estas niaj trezorejoj, kaj tial ni dediĉu nian apartan atenton al la kompletigo, ĝisdatigo kaj kunlaborado inter landaj kaj fakaj bibliotekoj.

3.3. Daŭre ni flegu kontaktojn kun esperantistoj ekster Eŭropo kaj helpu al ili laŭ diversaj praktikaj metodoj.

3.4. Aparte ni direktu atenton al la junularo, ĉefe en la furore disvolviĝantaj ekstereŭropaj movadoj.

3.5. Oni provu ligi la uzadon de Esperanto kun fakaj celoj, tiel ke Esperanto estu fonto de scioj de la esperantistoj pere de gazetoj kaj originalaj disertacioj.

3.6. Estu funkciigata bona koresponda servo tutmonda.

4. Kategorio IV (Edukaj kaj informaj demandoj):

4.1. Oni pligravigu la edukadon en nia movado. Edukado ĉefe rilatas al la kreskigo kaj trejnado de bonaj instruantoj de la lingvo Esperanto kaj taŭgaj movadorganizantoj.

4.2. Oni sisteme daŭrigu la esploradon pri pli efika informado por disponigi al ĉiuj aktivuloj materialojn ĉi-rilatajn kaj tiucele starigu „Centron pri Informado kaj Dokumentado".

4.3. La disponeblaj komunikiloj estu mobilizitaj por trafa informado al la ekstermovadaj medioj, ekz. pere de teleksiloj, telefaksiloj kaj komputilaj datumbankoj.

4.4. Oni starigu konstantan kadran eduksistemon ne nur en TEJO sed ankaŭ en UEA, tiel ke la movado povu transdoni la taskojn de generacio al generacio, akumulante la atingojn, problemojn kaj spertojn de la antaŭuloj por povi plibonigi kaj ĝisdatigi ilin.

4.5. Oni kultivu inter la esperantistaj kulturistoj la eblecojn transponti diversajn kulturajn valorojn tra la mondo kaj tiel klopodu iel konstrui internacian kulturon pere de Esperanto.

5. Kategorio V (Demandoj pri scienca aplikado):

5.1. Oni distingu inter la scienca (faka) kaj hobia agadoj. Oni ebligu vastan disvolviĝadon de la fakaj organizoj kaj vaste informu pri ilia agado la membrojn de UEA kaj de aliaj organizaĵoj.

5.2. Oni alvoku lingvistojn kaj aliajn specialistojn al kunlaboro kun esperantistaj samfakuloj rilate komunan studadon de koncernaj problemoj.

5.3. Oni stimulu kaj instigu pli fortan fakan agadon jam en la junulara movado, ekz. inter diversfakaj studentoj universitataj kaj altlernejaj, por ke ili estu preparitaj apliki Esperanton por siaj fakaj studoj kaj celoj.

5.4. Oni subtenu naciskalajn kaj internaciajn sociologiajn esplorojn pri la Esperanto-movado kaj aperigu artikolojn pri ekzistantaj ideoj ĉi-rilataj.

5.5. Oni kuraĝigu kaj organizu plurajn historiajn esplorojn, ekz. pri zamenhofologio, laborista Esperanto-movado kaj similaj.

5.6. Oni kunvoku kompetentajn tradukistojn en la Esperanta literaturo por komuna studado de tradukologiaj problemoj, ekz. normigo de historiismoj en diversaj naciaj literaturoj.

5.7. Oni kampanju mondskale por kolektadi diverstemajn kaj — fakajn scienc-teknikajn projektojn realigeblaj nur per internacia kunlaboro de esperantistoj kaj prezentu ilin al fondaĵoj el diversaj partoj de la mondo por subvenciado kaj eĉ plena financado por realigo.

6. Titoloj de la prezentitaj prelegoj (kaj prelegistoj)

6.1. Oszkar Princz (Hungario):
Rezultoj de la internacia Konferenco „Esperanto en la dua jarcento" (13.—16. 7. 1988) en Szeged

6.2. D-ro Detlev Blanke (GDR):
Resumo de la movadologia simpozio kadre de la 73-a UK en Rotterdam

6.3. Roland Schnell (Okcidenta Berlin):
Rekono de la realeco — bazo de ĉiu strategio

6.4. D-rino Věra Barandovska (ĈSSR):
Ĉu Esperanto lernendas? Kiuj lingvoj estas bezonataj en la mondo?

6.5. Yosimi Umeda (Japanujo).
Aktualaj problemoj en la Esperanto-movado — kaj progmatisma vojo al iliaj solvoj

6.6. Edward Symoens (Belgio):
Informoj, informatoj kaj informantoj — For la diletantismon!

6.7. Katrin Mattusch (GDR):
La Esperanto-parolkomunumo — kiel koncepti ĝin sociologie?

6.8. Oszkar Princz (Hungario):
Motivoj de esperantistiĝo

6.9. D-ro André Albault (Francio):
La rolo de la Akademio de Esperanto

6.10. D-ro Werner Bormann (FRG):
La Akademio de Esperanto: Funkcio en socio

6.11. Wera Blanke (GDR):
Aktualaj organizaj problemoj de terminologia laboro

6.12. Regina Thaller (Aŭstrio):
La Internacia Informa Centro por Terminologio (Infoterm, Vieno)

6.13. Michael Behr (GDR):
Komputile helpata administrado de leksiko

6.14. Akiko Nagata (Japanujo/Nederlando):
Logika bazo de Esperanto

6.15. Zofio Banet-Fornalova (Pollando):
Historio de la laborista Esperanto-movado — malfermita ĉapitro

6.16. Fritz Wollenberg (GDR):
Aktualaj taskoj de la zamenhofologio

6.17. Elena Ŝevĉenko (USSR):
Historiismoj en Esperanto kiel tradukologia problemo

6.18. Elsbeth Bormann (FRG):
Virina agado de UEA

6.19. Elfriede Kruse (FRG):
Spertoj kiel UEA-delegitino

6.20. Simo Milojeviĉ (Jugoslavio/Nederlando):
Enkonduko en la strategian planon de UEA

6.21. Ab durahman Junusov (USSR):
Informoj, informatoj kaj informantoj — for la diletantismon!

7. Al la programo krome apartenis jenaj vesperaj aranĝoj: Renkontiĝo kun la poeto Jiři Karen (ĈSSR), diskuto pri la Akademio de Esperanto (kun enkonduko de Detlev Blanke), prezento de la Monda Esperanto Centro Zamenhof (kun enkonduko de Jaroslaw Parzyszek, Pollando), lumbildprelego „Esperanto en Azio" (Y. Umeda).

8. Al la partoprenintoj estis disdonitaj i. a. jenaj dokumentoj: 2 konkludaj materialoj de la internacia konferenco „Esperanto en la dua jarcento" (13.—16. 7. 1988 en Szeged, Hungario), eseo de Bernard Golden „La leksikografia rolo de la Akademio de Esperanto".

Membroj de la Redakta Komisiono: Bartos, Hans-Peter (GDR), Mattusch, Katrin (GDR), Parzyszek, Jarek (Pollando), Symoens, Edward (Belgio), Umeda, Yosimi (Japanio)

Finredaktis: Blanke, Detlev

Esperanto-gramatiko en la brajla

Fine de 1987 la Asocio de Blinduloj en Bulgario eldonis brajlan version de „La tuta Esperanto" de H. Seppik (popularstila gramatiko de Esperanto). La tri volumoj enhavas sume 328 paĝojn kaj kostas 3 levojn. Informoj pri mend-eblecoj donas Bulgara Esperantista Asocio, p. k. 66, BG 1303-Sofio.

Monda Esperanto-Centro

La decidon pri la konstruado de la Monda Esperanto-Centro [MEC][1]) Bjalistoko oni alprenis la 26an de julio 1987, en la unua tago de la debatoj de la 72a UK en Varsovio, precize en la centa datreveno de la apero de la Unua Libro de Doktoro Esperanto. La proponon prezentis la prezidanto de la pola parlamento, Sejmo, kiu cetere estis la iniciatinto de la ideo — Roman Malinowski, plenumenta la funkcion de la Alta Protektanto de la 72-a UK. Kelkajn tagojn poste, dum la vizito de la kongresanoj en la naskiĝurbo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la 29an de julio 1987 sur la placo apud la monumento de la kreinto de Esperanto, oni subskribis historian dokumenton en la formo de fondoakto por la estonta Centro. Jam tiam estis sciate, ke la Centro estos starigita precize en la mezo mem de la urbo. La gvidantaro de Bjalistoko destinis por ĉi tiu celo 4-hektaran placon, en loko aparte inda kaj reprezenta.



La programon kaj premisojn de la Monda Esperanto-Centro en Bjalistoko samtempe ellaboris kaj la estraro de UEA kaj bjalistokanoj. En februaro 1988 ĉi tiujn du projektojn oni priparolis en Bjalistoko dum la vizito de prof. Humphrey Tonkin en la urbo, kaj en ĉio ĉi speguliĝis proponoj kaj Tiele kreiĝis la komuna vizio de la sugestoj de e-istoj en la tuta mondo. Centro. Ties ĉefa konstruaĵo estos monumenteca objekto, en kiu i. a. troviĝos: kongresa salonego por pli ol 1 000 lokoj, salonoj de diverslandaj komisionoj (ekz. Hispana Salono, Ĉina Salono ktp.), klubejoj, teatro-kinejo, restoracio, kafeterio, kafejo, teotrinkejo. En ĉi tiu konstruaĵo trovos por si novan sidejon ankaŭ la Filio de Pola Esperanto-Asocio en Bjalistoko.

En la ĉefa konstruaĵo multfunkcia okazos internaciaj e-istaj renkontiĝoj kaj konferencoj, regionaj kunvenoj, sciencaj simpozioj, debatoj de problemkomisionoj. Tie okazos ankaŭ lingvokursoj, en kiuj diversnivele oni instruos Esperanton. Krome okazos tie projekciadoj de filmoj, teatraj spektakloj en E-o. Oni klopodos, ke dum la tuta jaro en la Centro okazu diversaj esperantistaj aranĝoj, ekspozicioj, konkursoj ktp. En la komplekso de la konstruajoj de la Centro troviĝos ankaŭ muzeo kaj apude — biblioteko kaj legejo. Oni antaŭvidas, ke tie troviĝos — ligitaj kun E-o aŭ monda lingvoproblemo — presaĵoj, sondiskoj, sonkasetoj kaj videobendoj, filmoj, malnovaj kaj nuntempaj.

Post la funkciigo de la Centro komencos sian agadon esplorevoluiga fako, kiu i. a. gvidos lingvistikajn esplorojn, la esploradon de la aktuala stato kaj teoriaj ebloj de la faka aplikado de E-o, aliajn multaspektajn esplorojn ligitajn kun E-o. En la sfero de didaktiko la Centro kaj ties esplorevoluiga fako plenumos diversajn funkciojn de la instruado de E-o, instruado de la pola lingvo al eksterlandanoj, kulturado de E-instruistoj, studado de la arto traduki ktp. Povas esti, ke ĉi

tiujn taskojn plene aŭ parte transprenos la Filio de la Varsovia Universitato en Bjalistoko. Oni premisas la striktan kunlaboron de la bjalistokaj altlernejoj kun MEC, kaj ankaŭ kun alilandaj centroj.

En MEC trovos sian sidejon turismaj institucioj. La turisma-hotela fako konsistos el pruntepreneJoj de turismaj akcesorajoj, turisma priservejo, monŝanĝejo. Oni ankaŭ konstruos hotelon de luksa kategorio por ĉ. 400 lokoj kaj malmultekostan gastejon por ĉ. 300 personoj. La Centro disponos pri propraj radio-televidaj instalajoj kaj satelita televido, ĉi tie troviĝos ankaŭ libroeldonejo kaj gazetara konferencejo.

La finiĝon de la konstruado de MEC oni antaŭvidas en la jaro 1997, do post neplenaj dek jaroj. La unuajn gastojn oni akceptos en la jaro de la 250-jariĝo de urbaj rajtaj donitaj al Bjalistoko. La realigo de MEC en la antaŭvidata periodo grandparte dependas de monrimedoj, kies kolektadon lanĉis la tiucele fondita internacia Fondumo de L. Zamenhof. La 4an de junio 1988 en la Reĝa Kastelo en Varsovio okazis solena anonco de la akto pri la starigo de la Fondumo. Inter la ĉeestantoj de ĉi tiu solenajo estis i. a. Roman Malinowski — prezidanto de la Ĉefa Konsilantaro de Pola Esperanto-Asocio, pola parlamentestro, Humphrey Tonkin — prezidanto de UEA, Kazimierz Clapka — vicministro pri kulturo kaj arto kaj Zbigniew Kruszewski — nepo de la fama E-poeto Antoni Grabowski.

Samtage okazis la unua laborkunsido de la Estraro de la Fondumo, dum kiu oni akceptis formale la statuton, kaj oni priparolis la proksiman agadprogramon, kiun poste oni prezentis dum la 73a UK en Roterdamo.
En la konton de la Fondumo en la varsovia banko kaj ĉe UEA (en la subkonton) venas mondonacoj, krome venas ankaŭ objektaj donacoj, i. a. el Latvia SSR, Francujo, Nederlando, FRG. La Societo de la Amikoj de „Kurier Podlanski" donacis por MEC milionon da zlotoj, la Konsumkooperativo Spolem donacis 100mil zlotojn. La konto de la Fondumo L. Zamenhof — NBK PKO SA — I 0 en Varsovio nro 9002061 (Fondumo Zamenhof) plu estas malfermita.

[1]) Oni ĉom hezitas pri la nomo. Eble ĝi homiĝos „Centro Zamenhof".

Sanislaw Dobrowolski
(laŭ Kurier Podlaski)

KOMITATA REZOLUCIO [1988]

La Komitato de UEA:
aŭdinte raporton pri la proponata Centro Zamenhof en Bjalistoko kaj **ricevinte** diversajn skribajn informojn kaj raportojn dum la jaro;
rimarkinte, ke la Centro povus digne honori la memoron de d-ro Zamenhof kaj liaj samtempanoj, antaŭenigi la instruadon kaj studadon de Esperanto kaj Esperantologio kaj fortigi la Esperanto-kulturon, **subtenas** la kunlaboron de UEA en tiu ĉi projekto, **esprimas** sian pretecon kunlabori en la serĉado de monrimedoj por la programoj de la Centro, kaj **komisias** la prezidanton kaj ĝeneralan direktoron daŭre okupiĝi pri la projekto, reprezenti UEA en la estraro de la Fondumo Ludoviko Zamenhof, kaj raporti al la Komitato de tempo al tempo pri la progreso de la planoj.

En la urbo de Zamenhof

Kiel konate ekzistas la plano konstrui internacian Esperanto-Centron en la pola urbo Bjalistoko. Ĝi havas la provizoran nomon „Centro Zamenhof". Por popularigi la ideon kaj samtempe la naskiĝurbon de L. L. Zamenhof la bjalistokaj esperantistoj iniciatis novan serion de aranĝoj sub la nomo „Bjalistokaj Esperanto-Tagoj". La „1-aj Bjalistokaj Esperanto-Tagoj" okazis inter la 15-a ĝis 18-a de decembro 1988. Partoprenis pli ol cent

esperantistoj, inter ili la vicprezidanto de UEA, Yosimi Umeda (Japanio), la Ĝenerala Direktoro de UEA, Simo Milojevič (Nederlando), krome Wera kaj Detlev Blanke. En la kadro de la „Tagoj" kunsidis la Estraro de la Fondumo Zamenhof. La Fondumo havas la taskon gvidi la establigon de la Centro Zamenhof, pridiskuti kaj fiksi la celojn de tiu centro kaj entute kolektive okupiĝi pri la realigo de tiu interesa propono, kiun la prezidanto de la Pola Sejmo, marŝalo Malinowski, prezentis dum la 72-a UK en Varsovio al la monda esperantistaro. La prezidanto de la Fondumo estas Roman Malinowski. Vicprezidantas Humphrey Tonkin (UEA) kaj Roman Dobrzynski (PEA). Direktorino de la Fondumo estas Ewa Siurawska kaj sekretario Jaroslaw Parzyszek. Krome al la Estraro apartenas Simo Milojevič (UEA), Edward Symoens (ILEI), Detlev Blanke (CED), Stanislaw Dobrowolski, Jozef Jaworski, Jan Koszmaluk (TEJO), Danuta Markowska, Jerzy Slezak kaj Zbigniew Zdrojewski.

La programo de la „1-aj Bjalistokaj Esperanto-Tagoj" estis riča: Seminario pri „Esperanto kiel pontlingvo en la tradukado", infana teatro el Ełk, pupteatraĵo el „Dekamerono" el Bjalistoko, prezento de fragmentoj el „Sinjoro Tadeo" (en la traduko de Antoni Grabowski), prezento de la „Malgranda princo" de Antoine de Saint-Exupéry kiel monodramo fare de Barbara Łukaszewska, urbo-vizitadoj, aŭkcio, ekspozicioj k. a. Entute tre gratulinda ranĝo, kiu meritas kiel serio daŭrigon.

D. B.

Terminologia Seminario

En POPRAD (Altaj Tatroj), de la 12a — 21a de junio 1989 TEC*) ranĝos seminarion por organizantoj de terminologia laboro. Inter la 12a (alveno) kaj 21a (forveturo) okazos 7 labortagoj + 1 tuttaga ekskurso.

Skizo de programenhavo:

1. **Teoria fundamento:** nuna stato de terminologio kiel lingvoscienco kaj lingvoplanada praktiko; teoriaj orientiĝoj; praktikaj labormetodoj; ĝisnunaj atingoj; limoj kaj novaj evolutendencoj.

2. **Praktikaj ekzercoj:** nocia analizado; ellaborado de nociaroj; homonima kaj sinonima analizado; normigado; terminologia eluzado de fakaj tekstoj; kreado de terminologiaj kaj dokumentaj sliparoj (nurpaperaj kaj komputilaj).

3. **Terminografia projekto:** determino de terminologia esplorkampo; determino de terminologiaj fontoj; starigo de miksita laborkomitato (fakuloj kaj terminologoj); terminologia pritraktado de fontaj dokumentoj; ellaborado de terminologiaj dosieroj; redaktado de terminara projekto.

Ĉeflektoros d-ro E. Brent, Kanado, terminologo kaj lingvokonsilisto ĉe Office de la langue française; Infoterm (Vieno) kaj DLT (BSO. Utrecht) estas reprezentotaj.

Rajtas aliĝi ĉiu terminologie serioze interesita esperantisto, sed preferon havos TEC-anoj, speciale reprezentantoj de fakaj kaj landaj E-organizaĵoj kaj aliaj gvidantoj. 30 lokoj disponeblas, laŭeble frua aliĝo helpas tajlori la programon. La kostoj: 990,— CSK (Kčs) por loĝigo kaj manĝoj. Ni gastos en la famiĝantaj, ĵus rekonstruitaj, artmemoraĵaj domoj de Slovakia Esperanto-Asocio, kiu diversmaniere helpos la sukceson de la ranĝo.

Interesitoj skribu al:

Wera Blanke
Otto-Nagel-Straße 110
Pf 113-05
BERLIN
DDR—1141

*) TERMINOLOGIA ESPERANTO-CENTRO de UEA

Hoú Ĝiping

La disvolviĝanta scienc-teknika Esperanto-movado en Ĉinio

En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la ĉina Esp.-movado. La leviĝo de la ĉina scienc-teknika Esp.-movado estas elstara pruvo. Tion ni prezentos pli detale en jenaj flankoj.

1. Nombro da scienc-teknikaj esperantaj organizoj fonditaj

En la Dua Esperanta Laborkunveno okazinta en aŭgusto 1979 nombro da sciencistoj kaj teknikistoj diskutis pri disvolvo de scienc-teknika Esp-movado. En novembro 1984 okazis en Uhan la Unua Scienc-teknika Esperanta Simpozio de Ĉinio kun partopreno de 127 reprezentantoj el 25 provincoj. En la simpozio oni interŝanĝis 62 disertaciojn pri medicino, elektroniko, biologio, kemio, geologio, ĉigong-o k. a. kaj diskutis pri fondo de prepara grupo de tutlanda scienc-teknika Esperanta organizo.

Ekde tiam sinsekve fondiĝis 16 scienc-teknikaj Esperantaj organizoj en Ĉinio. Inter ili la ĉefa estas la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu fondis la filiojn geologian, medicinan, ekonomian kaj komercan, junularan kaj starigis rilatojn kun alilandaj Esperantaj sciencistoj kaj teknikistoj. La aliaj estas la Hubei-a Scienca Asocio Esperantista, la Gansu-a Scienca Esperanto-Asocio kaj la Guangxi-a Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio. Ankaŭ iuj grandaj kaj mezgrandaj urboj, kiaj Uhan, Ĉangĉun, Ĝinĉang, Ŝaŝi kaj Ĉangĝji, fondis scienc-teknikan Esperanto-asocion aŭ medicinan Esp-asocion.

2. Multiĝis scienc-teknikaj eldonajoj

La ĉinaj esperantistoj dekomence alte taksis aplikon de Esperanto en scienc-teknika kampo. En 1909, kiam Esperanto enkondukiĝis ĵus en Ĉinion, la Ĥina-Esperanta Scienca Literatura Revuo redaktita de Húa Nangui proponis apliki Esperanton por konigi sciencojn. La revuo aperigis sinsekve popularajn sciojn pri medicino, karbo, fervojo, paperfarado kaj farado de aerŝipo. Post sia fondiĝo la revuo El Popola Ĉinio aperigis pli ol 400 artikolojn pri sciencoj kaj teknikoj, ili vaste raportis pri scienc-esploraj atingoj kaj informoj de industrio, agrikulturo, nacidefendo kaj aliaj flankoj de Ĉinio. Estas menciinde, ke en la lastaj jaroj la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis plurajn sciencajn kaj teknikajn librojn, kiaj „Elektitaj Scienc-teknikaj Verkoj en Esperanto", „Aŭtobiografio de Bakterio", „Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva", „Brilas Saĝo", „Ĉinaj Protektataj Bestoj" kaj „Atlaso de Insekta Morfologio". Ĝi eldonos scienc-teknikajn librojn kaj terminarojn. Eldono kaj distribuo de tiuj libroj sendube estas aktiva kontribuo kaj akcelo por popularigi sciencajn sciojn kaj apliki Esp-on en science-teknika kampo. Ni prenu „Brilas Saĝo" kiel ekzemplon. La libro kolektis 66 eseojn pri bazaj sciencoj, kiaj matematiko, fiziko, kemio, astronomio, geologio kaj biologio, kaj ankaŭ pri modernaj teknikoj disvolviĝintaj surbaze de tiuj sciencoj, ekz., pri lasero, ultrasono, telesenso, komputilo, kosmonavigado, genetika inĝenierado, atomenergio kaj transistoro. Ili temas pri vastaj kampoj kaj uzas multajn terminojn.
En la lastaj jaroj „La Mondo" la organo de ĈEL, publikigis iujn artikolojn, eseojn kaj mallongajn informojn pri sciencoj kaj teknikoj por kuraĝigi sciencistojn kaj teknikistojn publikigi sian disertacion en Esperanto. En la bulteno „Entomoxonomia" (Entomologia toksonomio) redaktita de prof. Io Chou, parto da artikoloj portas Esperantan koncizan resumon. Prof. Io Chou eldonis ankaŭ Esperantan „Ĉinio Marŝas en Insekta Mondo". Krome, iuj medicinaj Esp-asocioj eldonas neregulajn organojn, kiaj „Medicina Farmacia Floro", „La Angulo de Medicina Ĝardeno" kaj „Informilo Medicina", kiuj aperigis nemalmultajn artikolojn pri medicino.

Kompreneble, la plej influa estas la trimonata revuo „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" eldonata de STEA sub ĈAS. Ĝi jam aperigis 13 numerojn kun pli ol 200 artikoloj, kiuj temas pri scienc-teknikaj fruktoj kaj informoj de diversaj fakoj. La revuo distribuiĝas al pli ol 40 landoj kaj regionoj kaj estas bonvena al diverslandaj esperantistoj.

3. Pli kaj pli da sciencistoj kaj teknikistoj lernas Esperanton

La Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko antaŭlonge jam difinis Esperanton kiel la duan fremdlingvon en ekzameno por promocii funkciulojn kaj diplomi esplorajn studentojn, kaj kulturis nombron da Esperantaj instruistoj por 53 politeknikoj, agronomiaj institutoj kaj universitatoj. Reveninte al sia instituto, iuj el ili funkciigis Esp-kurson, aliaj postlernohoran Esp-kurson. Milo da studentoj de politeknikoj lernas Esp-on. Ne malmultaj el ili eble fariĝos elito de la ĉina scienc-teknika Esp-movado.

En la socio pli kaj pli multaj sciencistoj kaj teknikistoj interesiĝas pri Esp-o. Ili lernas Esp-on pere de televidilo, disaŭdigo aŭ koresponda lernejo. En Ĉinio centoj da funkciuloj estas promociitaj trapasinte la duan fremdlingvan ekzamenon de Esp-o. Multaj sciencistoj kaj teknikistoj verkas disertaciojn por la „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj", „Scienca Revuo", „Geologio Internacia" kaj „Medicina Internacia Revuo". Tio montras, ke la ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj volontas konigi ĉinajn sciencajn atingojn al diverslandaj fakuloj pere de Esp-o, samtempe, ili sincere deziras interŝanĝi scienc-esplorajn informojn kun ili. Por tio, ili starigis rilatojn kun multaj sciencistoj, faris fruktodonan kunlaboron. La Esperanta-latina-ĉina „Atlaso de Insekta Morfologio" estas bona kunlabora ekzemplo de esperantistoj ĉina, hungara, norvega kaj finnlanda. D-ro C. Stop-Bowitz, akademiano de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de la Internacia Scienca Asocio Esp-ista verkis antaŭparolon por la libro. La ĉina-Esperanta „Propedeŭtiko de la Klerigscienco Prospektiva" estas kuna produktaĵo de ĉinaj kaj germanaj sciencistoj. La aŭtoro Helmar G. Frank verkis antaŭparolon por la Esperanta-ĉina eldono, montrante: „Informinterŝanĝo inter la fakuloj eŭropaj kaj ĉinaj pri kibernetika pedagogio estos instiga al la plua klereigkibernetika esploro kaj evoluigo kaj tiel akirigos al la (ankoraŭ ne sufiĉe granda) kibernetika skolo de la klerigscienco pli da atento de la pedagogaro kaj en Ĉinio, kaj en Eŭropo."

4. Sciencistoj fervore subtenas Esp-on

Multaj malproksimvidaj ĉinaj sciencistoj definitive subtenas Esp-on, precipe tiuj, kiuj lernis Esp-on en juneco, ankoraŭ havas fervoran senton al ĝi, malgraŭ ke iuj sciencistoj ne konas Esp-on kaj eĉ havas al ĝi partiecon.

Lu Ĝjaŝji, eksprezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, plurfoje kuraĝigis sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esp-on kaj apliki ĝin por disvolvi internacian sciencan kaj teknikan interŝanĝon. Post la fondiĝo de STEA sub ĈAS li ĝoje konsentis esti ĝia honora prezidanto.

Fama ĉina neorganika kemiisto Jan Dongŝeng estas prezidanto de STEA sub ĈAS. Li tre zorgas pri disvastigo kaj apliko de Esp-o en la scienc-teknika kampo. Li ĉeestis la inaŭguron kaj ferman kunsidon de la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto okazigita en 1986 en Pekino. En la kunveno li faris entuziasman paroladon, kaj gratulis la konferencon pro ĝia plena sukceso.

Aliaj 24 famaj ĉinaj geologoj, arkeologoj, meteologoj, fizikistoj, mekanikistoj, akustikistoj kaj matematikistoj invitite funkcias kiel konsilantoj de STEA sub ĈAS. Dank' al ilia subteno sukcese fondiĝis STEA sub ĈAS, eldoniĝis la „Tutmondaj Sciencoj kaj Teknikoj" kaj okazis la Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esp-o.

Nombro da famaj natursciencistoj kaj socisciencistoj aliĝis al la societo Amikoj de Esperanto. Ekz., Famaj fizikisto Ĝou Pejjúan, mekanikisto Tan Haúŝeng, entomologo Io Chou, juristo Ĝang Joútan, historiisto Ĝoú Guĉeng, ekonomikisto U Dakun k. a. Ili ĉiuj

kuraĝigas sciencistojn kaj teknikistojn lerni Esp-on kaj proponas aplikon de Esp-o al sciencoj kaj teknikoj. Dum dekoj da jaroj prof. Io Chou seninterrompe sin dediĉas al tio. Li diris: „La suno lumigas ne sole la altajn montojn, sed ankaŭ profundajn valojn. La hodiaŭa monda civilizacio estas kune kreita de la tutmondaj popoloj, la sciencoj kaj teknikoj estas komuna riĉaĵo de la homaro, ili ne devas esti monopoligitaj de iu individuo aú nacio. La sciencaj disertacioj devas esti publikigitaj en Esperanto por ke ĉiuj nacioj havu egalrajtojn kaj ŝancojn ĝui ilin." Tiuj vortoj de prof. Io Chou reprezentas la voĉojn de tiuj ĉinaj sciencistoj.

[„El Copola Ĉinio", 9/1988]

Ĉu la Terminologia Esperanto-Centro aktivas?

Dum la lastaj monatoj aperis opinioj, ke TEC nesufiĉe aktivas, ke ĝi produktas nur „paperojn" kaj ne terminarojn ktp. ktp. Tiaj opinioj aperas ankaŭ nialande, tial mi almenaŭ koncize respondu al ili.

TEC estis oficiale fondita dum la 72-a UK en Varsovio, nome 1987-07-27. Eĉ se ni kalkulos la preparan konferencon en Prago 1987-07-04, ni devas konstati, ke TEC ekzistas ne pli ol unu jaron kaj duonon/la artikolo skribita en decembro 1988/. Ĉu oni vere kaj serioze povis atendi amason da terminaroj ellaboritaj en la kadro de TEC dum tiom mallonga tempo? Se oni ne forgesas, ke **TEC** estas **normiga** terminologia **institucio** ellaboranta kaj aprobanta ĉiun nomenklaturan normon sub rigoraj kondiĉoj en antaŭe precize difinita kelkŝtupa procedo, kaj se oni havas almenaŭ minimumon da kono pri la terminologia laboro, tiam oni certe ne povas atendi post kelkaj monatoj librarojn plenŝtopitajn per normaj terminaroj. Ajna serioza terminologia laboro estas ege temporaba kaj energipostula laboro, des pli la agado kiu celas la normajn terminarojn. Eĉ bonaj terminaroj, kiujn ĝis nun ellaboris unuopuloj, devas subiĝi al internacia pridiskuto, por eviti ekz. naciismojn aŭ aliajn erarojn. Cetere, sincere dirite, estas raraj tiaj terminaroj aú nomenklaturaj proponoj de unuopuloj, kiuj estas senŝanĝe transpreneblaj kaj deklarindaj kiel normoj. Do, ni paciencu iom. Se ni postulas de TEC seriozajn rezultojn ni ne rajtas postuli de ĝi samtempe laboron hasteman kaj suprajan.

Kaj ĉu multaj paperaĉoj estis produktitaj de TEC? Ankaŭ al tiu ĉi demando mi devas respondi negative. En la unuaj monatoj de sia estado dediĉis TEC, resp. ties estraro, multe da tempo al la ellaboro de la regularoj por TEC kaj por ĝiaj unuopaj substrukturoj. En ili estas solvataj ne nur la organizaj problemoj en la Centro mem, sed ankaŭ la kunlaboro kaj ligoj al aliaj parencaj organizajoj en la Eo-movado. Ĉu perdita tempo? Certe ne! Tiel mi devas respondi precipe sub la influo de miaj malbonaj spertoj, kiujn mi havas el la jaroj de mia aktivado en la Ĥemia Fakterminologia Komisiono de tiutempa Terminologia Centro/TC/ de ISAE. Antaŭ du jardekoj karmemora Inĝ. Haferkorn el FRG, tiutempa direktoro de TC, estis fondanta fakterminologiajn komisionojn por unuopaj fakoj. Li intencis krei el ili normigajn labor-grupojn pli-malpli en la sama senco kiel nun volas TEC. Bedaŭrinde, inĝ. Haferkorn tro baldaŭ retirigis pro sanokialoj el la direktora posteno, antaú ol li povis firme difini kaj statute subteni la agadon de la fakterminologiaj komisionoj. Eble li eĉ iom subtaksis danĝerojn. Liaj posteuloj en la direktora „seĝo", inĝ. Broise kaj s-ro Eichholz, neniam konsideris unuopajn FTK, eĉ TC mem, kiel terminologiajn normigajn instituciojn. La komisionoj falis al la nivelo de simplaj kolektantoj de materialo por la Slipara Vortaro, eventuale por aliaj estontaj vortaroj. Cetere nemultaj komisionoj laboris vere komisionece, t. e. kolektive kaj sur internacia bazo. El la kolektita materialo unuopulo, ofte ne-

kompetenta por koncerna fako, elektadis tion kio plaĉis al li, forĵetante la ceterajon. Oni fakte ne priatentadis nomenklaturajn sistemojn, sed eltiradis unuopajn terminojn, fakajn nomojn. Tial mi kuraĝas diri, ke siatempa terminologia agado de TC fiaskis. Nome, ajna **moderna terminologia laboro** devas en si enteni samtempe la fenomenon de **sistemigo** kaj **normigo.** Sen tiu postulo la moderna terminologio perdus sencon. Se nun la estraro de la antaŭ nelonge fondita TEC volas en la unua stadio precipe **tute klare kaj precize,** per statutoj, regularoj kaj interkonsentoj, **difini la devojn, taskojn kaj rajtojn de TEC** kaj ties substrukturoj, difini ĉiujn rilatojn kaj ligojn al la eksteraj organizaĵoj kaj institucioj, certe ili ne trovos pli fervoran defendanton de tiu sia agado ol mi estas. Ne nur mi, sed certe plejmulto da fakuloj ne emas en sia fako vicon da jaroj konstruadi kolektive la konstruaĵon, el kiu poste nekompetentulo eltiros du — tri brikojn por forĵeti la ceterajon en rubejon. Mi eĉ opinias, ke tiu antaŭa „instituciigo" de TEC kaj ties komisionoj estas neevitebla kaj nepra antaŭkondiĉo. Nur kiam oni plenumos ĝin, oni rajtos postuli de la fakuloj tiun multjaran formikecan laboron super unuopaj normaj terminaroj kaj nomenklaturaj sistemoj. Ni komprenu: kvankam la plejmulto el ni ne ricevas salajron por la Esperanta terminologia laboro, tamen en la 2-a jarcento de nia lingvo ni jam ne rajtos labori diletantece, sed sur sufiĉa faka — „profesia" — nivelo.

Eĉ la ĝisnuna periodo de TEC ne estis tiom neproduktiva/kio temas pri terminaroj/kiel ŝajnas al iuj. TEC ne skribadis nur statutojn kaj regularojn. Estis kaj estas pridiskutataj kelkaj fundamentaj normoj por reguligi ĝenerale la laboran procedon en la tuta TEC. El la menciitaj normoj ekz. tiu pri „Fizikaj grandoj kaj unitoj" estas sendube norma terminaro. Cetere jam komenciĝis laboroj super pli specialaj normaj terminaroj, aŭ estas diskutataj bonaj terminaroj jam preparitaj fare de unupuloj.

Tial al la demando el la komenco de la artikolo „Ĉu TEC aktivas?" mi povas respondi jese. Kompreneble, ajna **kreema** kaj konstruema **kritiko** estas invitata kaj **bonvenigata,** sed pli bone estos se ĝin sekvos helpo kaj **serioza faka kunlaboro.**

Inĝ. Zdeněk Pluhař, landa reprezentanto de TEC, estrarano de ĈEA respondeca pri la kontaktoj kun TEC

Hans-Joachim Borgwardt 65-jara

La membro de la Centra Estraro, Hans-Joachim Borgwardt, agadas kiel prezidanto de la subdistrikta estraro de GDREA en Stralsund kaj plenumas neimageble multflankajn taskojn. Li instruas la lingvon, havas multajn kontaktojn al packomitatoj en Japanio, utiligas Esperanton por ekologio kaj organizas multajn vojaĝojn al Slovakio, agadas kun pioniroj ... Oni povus daŭrigi. Fakte nia amiko Hans-Joachim modele montras, kion devus fari prezidanto de subdistrikta estraro. Oni lernu de li. Kaj ni gratulas al li, kiu fariĝis 65-jara la 2-an de marto 1989.

CE de GDREA

Dankon al Ruth Schonert

Ekde la jaro 1971 Ruth Schonert estas administra sekretariino en la oficejo de GDREA (siatempe: Centra Laborrondo Esperanto en KL). Nun, la 31-an de majo 1989, ŝi havos sian lastan labortagon en la oficejo. Kaŭzo por danki al ŝi pro la multa, akurate, fakscie kaj ĉiam kontinue farita laboro. Ne imageblajn manuskriptomontojn ŝi venkis per tajpilo. Ne ĉiam la legenda skribo estis facile deĉifrebla. Erarojn en ŝia tajposkripto oni devis serĉi per lupeo, apenaŭ sukcese. La membroj de GDREA estimas ŝin pro ŝia helpemo kaj kompetenteco. Ankaŭ internacie ŝi havas amikojn kaj kolegojn.
Tamen, nun venis la tempo, ke ŝi ĝuos la merititan liberon de pensiulino. Ni tamen esperas, ke iel ŝi restos fidela al GDREA. Ankoraŭfoje dankon pro ĉio.

CE de GDREA

Esperanto estis laborlingvo en fervoja konferenco

De 4-a ĝis 6-a de oktobro 1988 en Pardubice (ČSSR) okazis konferenco kun internacia partopreno sub titolo „Scienc-teknikaj evoluoj de fervoja trafiko" okaze de 25-jara jubileo de la fervoja provringo Cerhenice. Ĝin organizis Esplor-instituto Fervoja kaj Domo de Tekniko Praha. Partoprenis proksimume 200 ekspertoj. Dank' al ago de kolego inĝeniero Petr Chrdle el la esplorinstituto, mondskale unuafoje Esperanto funkciis kiel laborlingvo en fervoja konferenco. Tio estis kontribuo al UNESKO-rezolucio 23 C / 11.11. La aliaj laborlingvoj estis ĉeĥa/slovaka, rusa (nur skribita kontribuaĵo de pola eksperto) kaj germana. Okazis 33 prelegoj, el tiuj 23 en ĉeĥa aŭ slovaka lingvoj, 5 en germana lingvo kaj 5 en Esperanto. Esperante prelegis partoprenintoj, kies gepatra lingvo ne estis laborlingvo, nome

— István Gulyás (Hungario) pri „Situacio kaj evoluo de fervojaj komunikoj inter eŭropaj urbegoj",
— József Halasz (Hungario) pri „Kelkaj problemoj de movgeometrio ĉe fervojo",
— Lájos Sekeres (Jugoslavio) pri „Modifo de dutraka fervojlinio al unutraka el vidpunkto de sekuriga tekniko",
— Gvozden Srediĉ (Jugoslavio) pri „Teknologio de kontenera trafiko ĉe eŭropaj fervojoj: evoluo, defioj kaj perspektivoj"
kaj
— Jan Otto de Kat (Nederlando) pri „Magnete ŝvebanta inercirado por elektro-mekanika energi-konservado".

Kontribuaĵo „Kvantifikado de kolizia danĝero ĉe trak-konverĝoj" fare de Heinz Hoffmann (GDR) estis ja germanlingve prelegita, sed kiel originala, esperantlingva teksto transdonita al la interpretisto. Tiujn 6 prelegojn publikigos fakĵurnalo HUNGARA FERVOJISTA MONDO.

Sekve de la partopreno de esperantistoj, la konferenco havis pli internacian karakteron, ĉar ne ĉeestis aliaj gastoj el Hungario, Jugoslavio kaj Nederlando. Aliaj eksterlandanoj venis el FRG, GDR kaj Kubo. Tutsukcesa por niaj lingvo kaj movado estis la fakto, ke oni bone demonstris funkciadon de Esperanto en faksciencaj tekstoj. Per radiofono oni interpretis simultane al 3 lingvoj: ĉeĥa, germana kaj Esperanto. Por interpretado ĉeha/germana dejoris profesia simultan-interpretistino, sed ne fervojfaka. Ĉar ne ekzistas profesia simultan-interpretisto ĉeha/Esperanto, lingvoamiko fervoj-inĝeniero Kovař deklaris sin preta interpreti. Li tre bone regas Esperanton, sed kompreneble ne povas samnivele simultane interpreti kiel instruita profesiulo. Tiu laboro ja postulas eksterordinaran talenton, specialan lernadon kaj tre intensan trejnadon. Se la interpretinto havis skribitan tekston de la prelego, kaj la preleginto obeis al la teksto, la interpretado sukcesis. Sed ne ĉiuj prelegintoj transdonis siajn skribitajn tekstojn, kaj ne ĉiuj obeis al siaj preparitaj vortoj. Lastakaze la Esperanto-aŭskultintoj aŭdis nur onon de la prelego. Do, por estontaj internaciaj konferencoj kun Esperanto kiel laborlingvo, urĝe necesos instrui Esperanton al simultan-interpretistoj aŭ instrui simultan-interpretadon al esperantistoj.

La 5-an de oktobro vespere la partoprenintaj esperantistoj vizitis pardubican Esperanto-grupon en ties klubejo. Oni aranĝis interesan konversaciadon pri la konferenco kaj pri la urbo Pardubice. La partoprenintoj dankis pro la gastamo. **Heinz Hoffmann**

La centra koresponda kurso de GDREA

Iom de statistiko

1. En januaro 1988 la Estraro de GDREA lanĉis centran korespondan kurson de Esperanto, kiu celis, paŝo post paŝo, transpreni la taskojn de diversaj regionaj tiuspecaj kursoj. Samtempe ĝi intencis establi bone funkciantan reton de konsultlokoj

en ĉiu distrikto por ebligi ekzercadon de prononco, parolo, aŭskultado kaj por organizi unuajn rektajn kontaktojn. La unuaj kursanoj aliĝis la 1-an de marto, kaj niaj spertoj ĝis fino de 1988 rajtigas nin statistike konkludi por la venontaj jaroj, vidi kien falis la fruktoj de la laboro de dudeko da personoj (apud la centraj mentoroj B. Krone, M. Ludewig, D. Berndt, M. Lennartz, U. Becker ja ankaŭ gravis la rapida reago de la distriktaj estraroj).

Ĝis decembro 1988 aliĝis 314 personoj el ĉiuj distriktoj de GDR. Por tiu dekmonata unua stadio de la kurso tio estas granda sukceso kiu aspirigas rapidan kreskon de la membronombro de nia asocio kaj do pli fortan kaj pli interesan bazan laboron. La unua parto de la kurso konsistas el 14 lecionoj ellaboritaj de Ludwig Schödl. Ĝi intense peras ĉirkaŭ 900 morfemojn kaj la bazajn gramatikajn regulojn. La dua parto havigas al la lernanto pli ol 1500 morfemojn (ne plusajn, ĉar ĝi rekomenciĝas kvazaŭ la kursanoj ne havus bazan scion) kaj pli detaleme kaj nuancite klarigitan gramatikon. Ĝi konsistas el la 20-leciona lernolibro de Till Dahlenburg kaj Peter Liebig kaj el suplementa materialo por aŭtodidaktoj. En tiu ĉi dua parto nuntempe lernas 22 kursanoj (t.e. 7 %). Plej ofte post apero de anonco en centraj aŭ distriktaj gazetoj ni ricevas multajn aliĝpetojn. De tempo al tempo persona informo aŭ ekspozicio instigas al la partopreno. Menciindas ankaú malgranda grupo da personoj kiu lernas per la koresponda kurso precipe pro faka intereso. Temas pri kelkaj radio,amatoroj kaj komputilistoj. Do almenaŭ ĉi tie jam efiketas la enpenetro de Esperanto en fakajn mediojn.

La koresponda kurso havas du ĉefajn celgrupojn: la loĝantaron de vilaĝoj kaj de malgrandaj urboj, en kiuj alimaniere ne eblas lerni Esperanton pro manko de kursoj, kaj tiujn multegajn homojn kiuj estas troŝarĝitaj de laboro kaj de socia agado, tiel ke ili ne trovus la necesan tempon por regule ĉiusemajne partopreni rektan kurson en vesperaj lernejoj aŭ en grupoj de Kulturligo.

2. La intereso pri nia kurso venas el ĉiuj distriktoj de nia lando, sed ne samkvante. Nur el kvar (Leipzig, Berlin, Dresden, Karl-Marx-Stadt) venas jam preskaŭ la duono de la kursanoj (47 %). Kaŭzoj por tiu sukceso povas esti la denseco de la loĝantaro en tiuj distriktoj, jam vigla Esperanto-movado kaj bona distrikta varbado por la koresponda kurso. La duan grupon konsistigas la distriktoj Halle, Rostock kaj Magdeburg (kune 26 %), la restantajn 27 % donas la aliaj ok distriktoj.
La ĉefa parto de la kursanoj venas el la grandaj urboj. Nur el la distriktaj ĉefurboj devenas 37 %. El vilaĝoj partoprenas nur 24 % de la kursanoj.

3. Interesa estas ankaŭ la faka kvalifiko kaj la socia stato de la partoprenantaro. Laŭ la indikoj sur la aliĝiloj 5 % de la kursanoj estas ankoraŭ lernantoj (en ĝenerala aŭ profesia lernejo), 8 % estas armeanoj, 1 % estas hejmmastrinoj, 5 % estas pensiuloj (pro aĝo aŭ invalideco), 2 % laboras sen iu profesia kvalifiko, 41 % havas fakan profesion kaj laboras, 6 % estas studentoj en fak- aŭ altlernejoj kaj 26 % havas profesion por kiu necesis studado en fak- aŭ altlernejo. 6 % ne indikis sian profesion.
La profesioj de la kursanoj donas eble surprizan bildon: 9 % inter ili havas ekonomian profesion, 8 % teknikan, 7 % estas instruistoj kaj 6 % laboras sur la medicina kampo. Po 2 % estas fervojistoj kaj elektronikistoj. Apenaŭ troveblas kursanoj kiuj profesie okupiĝas pri lingvoj (nur unu tradukisto kaj kelkaj el la instruistoj).

4. Ĝenerale la kursanoj multe pli malrapide lernas ol ni supozis antaŭe. Nur en la monato marto de 1988 komencis la kurson 43 perso-

noj. Ĝis fino de la jaro nur 14 personoj sukcese atingis la celon de la 14a leciono. 12 inter ili kontinuis en la dua parto de la kurso (ła aliaj dek kursanoj de la dua parto venas el regionaj kursoj). Sed verŝajne baldaŭ multe pli granda grupo finstudos la unuan parton, ĉar konsiderinda nombro da studentoj nun okupiĝas pri la lastaj du-tri lecionoj de la unua parto.

5. Ĝis fino de 1988 nur kvin kursanoj oficiale eksiĝis el la kurso, sed proksimume 15—20 % jam dum danĝere longa tempo ne reagis al la mentoroj. Tamen de tempo al tempo unu el ili reaktiviĝas. Kaŭzoj por la eksiĝo estas manko de tempo por serioza studado de la lingvo kaj malĝusta opinio pri la facileco de Esperanto.

La granda nombro da regule respondantaj studantoj vigle interesiĝas pri tre diversaj aspektoj de Esperanto kaj de ĝia movado. Ne malofte komenciĝas por la mentoro iom temporaba korespondado pri tiuj temoj. Multaj jam dum la unua parto de la koresponda kurso abonas kaj legas Esperanto-revuojn, aŭskultas Esperantan radion kaj estas membroj de lokaj kluboj. Ĉirkaŭ tridek kursanoj partoprenis unusemajnan centran lingvokurson en Lychen, kaj multaj uzis la eblecon konsulti spertajn esperantistojn dum la konsultotagoj organizitaj jam de kelkaj distriktaj estraroj.

6. Por pliefikigi la korespondan kurson estas planita sonkaseto kun kelkaj tekstoj de la unua parto de la kurso, krome ni planas verki tute novan kursmaterialon por ambaŭ partoj, en kiun eniros multaj sugestoj de kursanoj kaj mentoroj.

7. Konklude du demandoj kiujn respondi ŝajnas simple: Kiel atingi multe pli grandan nombron da kursanoj? Kaj kiel altiri al la movado tiujn kiuj kun sukceso lernas koresponde? La respondoj restas la kutimaj: organizi almenaŭ tri konsultotagojn en ĉiu jaro kaj en ĉiu distrikto, inviti la kursanojn al semajnfinaj kaj aliaj lingvaj kursoj por paroligi ilin, inviti ilin al grupaj vesperoj kaj regionaj aranĝoj, informi ilin pri la laboro de la ekzistantaj fakgrupoj kaj komisionoj kaj, memkompreneble, pluvarbi por la centra koresponda kurso, en gazetoj kaj dum ekspozicioj, ĉar ĉiu progreso dependas de tio. La koresponda kurso povos efiki al la disvastiĝo de Esperanto en nia lando en konsiderinda dimensio.

Ulrich Becker

Semajnfinaj lingvokursoj
(Spertoj el pli ol dekjara praktiko)

Daŭra tasko en la baza laboro de nia movado estas la organizado de kursoj por lingva kvalifikado de interesitoj. Grava manko de kursoj ofte estas nesufiĉa aŭ tro malfrua praktika aplikado de la lingvo. Tiun taskon devas transpreni la distriktaj kaj subdistriktaj estraroj, ĉar centraj seminarioj ofte celas alion.

1. La partoprenantoj de semajnfinaj lingvokursoj havas tre diferencajn lingvokonojn kaj aĝojn. Tion oni konsideru dum la starigo de diversaj grupoj:

   a) komencantoj: partoprenantoj de Kulturligaj, vesperlernejaj aŭ korespondaj kursoj kaj aŭtodidaktoj.

   b) progresintoj: partoprenantoj en la kursoj por progresintoj kaj membroj de la korespondaj kursoj,

   c) konversacio: partoprenantoj kiuj jam finis kurson de progresintoj aŭ la korespondan kurson II, aŭ lingvospertaj esperantistoj,

d) infangrupoj (ĝenerale komencantoj); komuna kurso de lernejaj infanoj kaj plenkreskuloj ne montriĝis efika en la praktiko.

2. Laŭ la diferenca lingva nivelo eblas jenaj ekzercoj:
   a) laŭta legado kaj tradukado,
   b) legado de esperantlingva teksto por kompreni kaj poste nacilingve rakonti ĝin,
   c) dialogado, ludante en situacioj (en magazeno, en stacidomo, kaj tiel plu),
   d) vortfarado, ankaŭ helpe de lingvaj ludoj,
   e) prelegetoj de la partoprenantoj pri iuj temoj,
   f) priskribado de bildoj

   kaj multaj aliaj.

   Tre gravas la korekta lingvouzo. La kursestro havas la taskon organizi dum la instruhoro interesan, senpaŭzan lernadon aktivigante ĉiun unuopan partoprenanton.

3. Teknikaj antaŭkondiĉoj:
   Por la certigo de sukcesplena lingvokurso necesas laŭplana kaj longtempa preparado. Depende de la lokaj kondiĉoj oni klarigu sufiĉe frue, ofte monatojn antaŭe, jenajn problemojn:
   a) fikso de la dato (proks. unu jaron antaŭe),
   b) certigo de instruĉambroj (por ĉiu grupo),
   c) loĝigo de la partoprenantoj (hotelo, internulejo, privata loĝejo),
   d) certigo de nutrado (tagmanĝo, vespermanĝo),
   e) havigo de kursestroj (por po 7 ĝis 10 kursanoj unu kursestron),
   f) invito kaj informado (proks. 8 semajnoj antaŭe); postulu ĝustatempan respondon por povi precizigi la nombron de partoprenantoj por la tranoktejo kaj manĝejo,
   g) fikso de kotizoj,
   h) certigo de honorarioj por la kursestroj.

4. Variantoj:
   a) La kurso okazas nur sabate. Avantaĝoj: pli malmulte da organizaj problemoj; la lingvokurso povas okazi dum pluraj sabatoj. Malavantaĝoj: malfavora por partoprenantoj el foraj loĝlokoj; maltrankvilo dum la kurso pro malfrue alvenantaj kaj frue forveturantaj kursanoj.
   b) La kurso komenciĝas jam vendrede vespere. Avantaĝo: La kurso certigas al si plenajn kaj trankvilajn sabaton kaj dimanĉon. Malavantaĝo: pli da organizaj problemoj.

5. Financoj:
   Enspezoj kaj elspezoj de semajnfinaj lingvokursoj devas esti temo de la financa planado de la distrikta estraro (ĉiam junie de la antaŭa jaro). Oni konsideru jenajn elspezojn:
   a) lupagojn,
   b) nutradon, vojaĝkostojn, honorariojn por la (eventuale eĉ eksterlandaj) kursestroj,
   c) nutradon, vojaĝkostojn de la partoprenantoj.

   Sola enspezo estas la partoprenkotizoj. Celo estu financa ekvilibro inter elspezoj kaj enspezoj.

6. Rekomendoj:
   Regule organizataj lingvokursoj estas eblaj en ĉiuj distriktoj de GDR. Ili estas necesaj por homoj kiuj sub malfavoraj kondiĉoj lernas Esperanton (koresponda kurso, aŭtodidaktoj). Gravas la morala efiko de tiuj aranĝoj pro komunaj travivaĵoj inter esperantistoj kaj pro intensa apliko de la lingvo. Precipe valoraj estas tiuj semajnfinaj aranĝoj por lokoj en kiuj ne ekzistas konstantaj aliaj kursoj. Montriĝis taŭge organizi ilin dufoje ĉiujare ekster la normala feria tempo. Por la konversaciaj grupoj tre valoras fake kvalifikitaj eksterlandaj gastoj, tamen ĉiu distrikta estraro klopodu kvalifiki ĝustatempe proprajn esperantistojn kiuj kapablas plenumi la taskon de kursestro.

(Laŭ materialo de Werner Pfennig)

Novtipaj seminarioj en Lychen

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1988 Centra Estraro de GDREA ofertis al Esperanto-lernantoj du jam tradiciajn kvartagajn seminariojn en la hotelo „Ratseck" en la belega, interlaga urbeto Lychen, iom norde de Berlin. Kaj kiel ĉiujare, la seminarioj celis lingvan kaj fakan kvalifikadon de la partoprenantoj por instigi ilin aktive kunlabori enkadre de nia asocio. Sed en 1988 tiuj ĉi du aŭtunaj seminarioj ekhavis novan, iom ekskluzivan karakteron: Ili fariĝis parto de la sukcese funkcianta koresponda kurso, kaj pro tio estis invititaj ĉefe la partoprenantoj de tiu ĉi kurso. Gravaj taskoj de la novtipaj seminarioj estis (kaj restos sekvontjare) kontaktigi komencantojn unu kun la aliaj, peri unuajn informojn pri la nacia kaj internacia Esperanto-movado kaj, memkompreneble, instrui Esperanton.

La unua seminario okazis de la 9a ĝis la 14a de oktobro 1988. En ĝi rajtis partopreni ĉiuaĝaj kursanoj. Alvenis 30 personoj el ĉiuj partoj de GDR kaj rumanino nuntempe laboranta en GDR. En la dua seminario okazinta de la 20a ĝis la 25a de novembro rajtis partopreni nur junuloj ĝis 30 jaroj. Venis 19, inter ili vjetnamino kiu ankaŭ dumtempe laboras ĉe ni.

La programo dum ambaŭ semajnoj konsistis el lingvoinstruado (U. Becker) kiu precipe ekzercis paroladon kaj aŭskultadon (post bazaj fonetikaj ekzercoj kaj post enkonduko en la strukturon de Esperanto), el prelegoj, interparoloj kaj diskutoj kun pluraj gastoj (d-ro D. Blanke: Esperanto en GDR kaj internaciskale; F. Wollenberg: Historio de la Esperanto-movado; T. Bendias: Junularo kaj Esperanto; M. Ludewig kaj B. Krone: Problemoj de la koresponda kurso). Venis pluraj valoraj kaj realigeblaj proponoj por la pliefikigo de la koresponda kurso. Entute ĉiuj eroj de la programo vekis la intereson de la partoprenintoj, kion pruvis multaj demandoj kaj pluraj bonaj ideoj por aktivecoj. Ĉiu trovis sufiĉe da motivoj por pli intensa plulernado. Do, la seminarioj sukcesis. Al tio ankaŭ kontribuis la rapida interkonatiĝo, la agrabla kaj gaja atmosfero, kaj la amuzaj vesperoj, dum kiuj tamen ofte Esperanto dominis dum ludado kaj babilado. Cetere la Esperanto-kursoj en Lychen estas jam tiom tradiciaj kaj konataj en la urbeto, ke dum la dua seminario la Lychen-a muzikgrupo „Tahare" senpage prezentis al ni plurhoran, bonegan koncerton (gitaristo/kantisto, trumpetisto, tamburisto). Do ankoraŭa novaĵo: la unua seminario en Lychen kun altkvalita kulturporgramo (bedaŭrinde ankoraŭ ne en Esperanto)!

En la sekva jaro denove okazos du seminarioj en Lychen, kaj denove aŭtune, por partoprenantoj de la koresponda kurso. La mentoroj ĝustatempe informos pri ili.

U. Becker

Rikolto en preparo

Okaze de la 75-jariĝo de Prof. D-ro Juan Régulo Pérez en marto 1989, la brazila eldonisto Gersi Alfredo Bays decidis eldoni la kolekton de la Esperantaj artikoloj de Régulo sub la titolo RIKOLTO — projekto iam antaŭvidita en la Stafeto-serioj.

Editoroj de la ampleksa volumo estas Reto Rossetti kaj Reinhard Haupenthal. Enkondukon verkos Prof. Gaston Waringhien. Ĉar bibliografiaj antaŭlaboroj ne ekzistas (la Bibliografio en **Serta I** estas tre nekompleta pri Esperanto) necesas traserĉi multajn librojn kaj revuojn. Por faciligi tiun laboron kaj por eviti mankojn la teknika redaktoro (R. Haupenthal, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt) petas pri atentigoj al artikoloj de Régulo.

„Fokuso" informas

„Fokuso" pardonpetas. Estas ŝtelita la ŝarĝaŭtomobileto de Hung. E-Asocio, en kiu troviĝis granda kvanto de la ĝisnunaj numeroj de „Fokuso" kaj ankaŭ manuskriptoj. Tial ni povos sendi la petitajn provekz. nur post kelkaj monatoj, kiam presiĝos (pligrandkvante) n-ro 4/88. Tiu incidento bedaŭrinde prokrastas la aperon de la sekvaj numeroj, pro kio la red. petas la komprenemon de la legantoj.

Pli da kritikoj pri la Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro (PIVS)

Mi ĝenerale konsentas kun la pritakso, kiun Michael Behr faris en sia recenzo de la Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro (PIVS) (Der Esperantist, 1988, n-ro 4 (150), pĝ. 89-90). En tiu ĉi aldonaĵo al liaj komentoj mi deziras emfazi kelkajn punktojn, kiujn li preteratentis.

1. Nekompletaj difinoj

Ĉar mi okupiĝis pri kelkaj el la neologismoj registritaj en PIVS, mi tuj rimarkis, ke la artikoloj estas mankhavaj, t. e. la difinado ne estas kompleta. Du ekzemploj ilustros tion. PIVS ne indikas, ke la vorto „artefakto" estas faktermino en la arkeologio kaj la biologio. Komparu mian kompletan difinon kun la dulinia klarigo en PIVS: „objekto produktita de la krea aŭ inventa kapablo de homo".

artefakto. 1. (arkeologio) objekto kiel ilo, ujo, ornamaĵo aŭ artaĵo, montranta prilaboron aŭ uzon fare de la homo; produktaĵo de la krea aŭ inventa kapablo de la homo. 2. (biologio) nenatura strukturo en kemie aŭ fizike preparitaj animal — kaj vegetalhistoj, rezultanta de la preparado.

Ankaŭ „rehabiliti" estas nur parte difinita, ĉar PIVS donas nur la juran signifon: „redoni al iu maljuste kondamnita liajn rajtojn aŭ honoron". „Rehabiliti" estas same grava faktermino en la medicino por indiki la procedon redoni al handikapito aŭ malsanulo la kapablon integriĝi en la socio kaj, eventuale, entrepreni laboron. La tria signifo de „rehabiliti" apartenas al la komunuza lingvo; ĝi estas uzebla en kuntekstoj temantaj pri la reakcepto de personoj aŭ ideoj, eĉ literaturaj formoj, kiuj dum iu periodo estis kondamnitaj aŭ fariĝis nepopularaj, eksmodaj.

2. Misa ĝustigo de „eraroj"

Unu el la celoj de la redaktoroj de PIVS estis kaj korekti jam ekzistantajn artikolojn en PIV. Mi trovis unu ekzemplon de ĝusta vorto registrita en PIV en 1970, kiu en PIVS ricevis „korekton" pro tute nekomprenebla kialo. En PIV kecalo estas birdo el Suda kaj Meza Ameriko, kies Esperanta formo akordas fonetike kun la hispanlingva etimo quetzal (elp. kecal). Tamen en PIVS, sur pĝ. 24 kaj 27 estas indikoj, ke la vorto devas havi la formon „kvezalo"!!! Kial?

3. Formoj de neologismoj

En sia recenzo, s-ro Behr tuŝas tre gravan punkton, kiam li demandas: „Ĉu ne ekzistas ĝeneralaj rekomendoj por la formo de neologismo?" La respondo estas: „Ne!" Ĉiu aŭtoro, ĉiu esperantisto, formas neologismojn laŭ sia bontrovo. Ĝis nun ne okazis provoj formuli konkretajn kaj devigajn regulojn por elimini ambuguecojn kaj minimumigi leksikan kaoson. Al s-ro Behr ne plaĉas neologismoj havantaj afikson kiel parton de la radiko; li donas la ekzemplon de la silabo „ge" en „gemuta". Aliaj ekzemploj estas „armadilo", „eksvoto" kaj „modemo", kiuj povas esti misinterpretitaj de komencantoj, se ili provas dismembrigi la vortojn.

Multe pli grava mispaŝo farita de la redakcio de PIVS estas la enkonduko de paronimaj vortformoj, kiuj dum la tuta historio de Esperanto malfaciligis la lernadon kaj uzadon de la lingvo. Oni pensu pri stumbligiloj kiel „pesi/pezi", „oferi/oferti" kaj „damaĝi/domaĝi". Pro tio mi ne aprobas neologismojn kiel „akĉento", kaj „ŝabato", ĉar jam ekzistas preskaŭ identaj formoj: „akcento", „sabato".

4. Malnovaj neologismoj

Ankoraŭ unu celo de PIVS estas registri „la vere dezirindajn kaj fakte uzatajn novaĵojn". Estas eble verki apartan studaĵon nur pri la elekto de neologismoj en PIVS. Kelkaj demandoj postulas respondon por pravigi la ekskludon de vorto. S-ro Behr mencias „gemuta", signita kiel poezia termino signifanta „hejmeca, agrabletosa". Laŭ mia klasifikado ĝi estas malnova neologismo, ĉar ĝi komencis aperi en Esperantaj verkoj antaŭ kelkaj jardekoj, same kiel „darfi", ekuzita en la 1920-aj jaroj. Tamen, „darfi" ne estas registrita en PIVS, kvankam tiuj, kiuj uzis kaj uzas ĝin, ne faras tion en poezia kunteksto; „darfi" ja apartenas al la komunuza lingvo. Kial, do, „gemuta" estas registrita en PIVS kaj

„darfi" estas ignorata. Io ne estas en ordo malantaŭ la redakcia pordo.
Dua neologismo, kiun listigas la recenzinto, estas „supernovao", astronomia fakvorto signifanta gigantan steleksplodon. Kiel, do, klarigi, ke alispeca enorma forbrulado rilatanta al la homaro — „holokaŭsto" (amasa genocido) — ne estas registrita en PIVS? Antaŭ pli ol unu jardeko Julius Balbin verkis poemon, kiu komenciĝis per akuzo kontraŭ PIV, ĉar la vorto „holokaŭsto" ne estis registrita en tiu vortaro. Se la redaktoroj de PIVS vere trakribris numerojn de la magazino Monato, ili estus povintaj trovi, ke „holokaŭsto" aperas en artikoloj pli ofte ol „supernovao". Tiuj du ekzemploj estigas dubojn pri la kriterioj uzataj de la redaktoroj por kompili PIVS kaj prijuĝi la gravecon de neologismoj en la nuntempa lingvo.
Ankoraŭ unu neadekvate registrita vorto en PIVS estas „manaĝero", kiu ricevis tro mallarĝan difinon: „persono, kiu prizorgas la negocajn aferojn de sportaj aŭ artaj entreprenoj, aŭ de sportistoj aŭ artistoj." Jam en 1931 Jean Forge uzis la formon „menegero" kun rilato al dancistinoj kaj boksisto. En postaj jaroj la formo kaj signifo de la vorto ŝanĝiĝis. „Manaĝisto" (de boksisto) aperis en Monato en 1980; en la sekva jaro la sama periodaĵo uzis la esprimon „manaĝisto de franca firmao". La vorto „entreprenisto" estis interkrampe glosita per „manaĝisto". En Budapeŝta Informilo en 1985 estas menciita ĉina Instituto pri Manaĝerado-Scienco. En 1988 UEA anoncis en la revuo Esperanto, ke la organizaĵo serĉas konstantan kongresan sekretarion, inter kies kvalifikoj estu „studoj pri ekonomiko, sociologio aŭ manaĝeraj sciencoj". Estas evidente, laŭ la konteksto de la ĉi-supraj citaĵoj, ke manaĝero estas ankaŭ entreprena administranto aŭ direktoro. Se la redakcio de PIVS aŭdacis modifi la difinon de „komputi" kaj „komputilo", kaj enkonduki la paroniman neologismon „kompti", kial ili preteratentis la morfemon „manaĝ" kaj ne ĝisdatigis la difinon de „manoĝero"?

5. RePIV — Reviziita Plena Ilustrita Vortaro

Ĉe la fino de sia recenzo, s-ro Behr skribas, ke maltrankviligas lin la penso, ke okazos longa prokrasto antaŭ/ol estos efektivigita nova versio de PIV. Nu, de ie kaj tie aŭdiĝas nuntempe flustroj, ke la reviziita versio de PIV estos entreprenita, sed specifaj detaloj mankas: kiu respondecos pri la laboro, kiam ĝi komenciĝos, kaj kiam oni esperas eldoni ĝin? Mi jam proponis, ke la Akademio de Esperanto okupiĝu pri tiu projekto kaj starigu principojn aŭ gvidliniojn por la formado de novaj vortoj. Mi nun atendas reagojn.

Bernard GOLDEN, Damjanich u. I/C, I. 8., H—8200 Veszprém, Hungario

---

Nikola Aleksiev: Esperanto. 100-jara. 1887 — 1987.
Esperanto — 100 godini. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio 1987, 234 p. [en la bulgara lingvo]

Okaze de la jubilea jaro en multaj landoj aperis nacilingvaj broŝuroj aŭ artikoloj, foje eĉ libroj, pri la centjara Esperanto. La bulgarlingva verko de Nikola Aleksiev apartenas al tiuj bonvenaj materialoj. La aŭtoro, kiu ne nur konas bonege la internacian Esperanto-movadon, mem kunkreis parton de ĝi, en bulgara kaj internacia skalo. Kiel prezidinto de Bulgara Esperantista Asocio (BEA) kaj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kiel kunfondinto de Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BulEA) li estas tute kompetenta doni materialon pri la centjara planlingvo. La libro enhavas jenajn ĉapitrojn:

I. La problemo pri internacia lingvo
1) Neceso de internacia komunikado
2) Alpreno de iu nacia lingvo por internacia komunikado
3) Ĉu estas ebla artefarita (plana) lingvo?
4) La kreinto-iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto
5) Ĉu individuo povas krei lingvon?

II. Bazaj informoj pri Esperanto
1) Konciza (plej ĝenerala) karakterizo de Esperanto en 100 linioj
2) Konkretaj ekzemploj el la gramatiko kaj vortaro de Esperanto

3) Kial oni nomas Esperanton ‚helpa' lingvo
4) La „Granda sovetia enciklopedio" pri Esperanto
5) La „Konciza enciklopedio de GDR" pri Esperanto
6) La rilato de UNESKO al Esperanto
III. La socialismo kaj la internacia lingvo
IV. Opinioj de elstaraj personoj
V. Literaturo en Esperanto
1) Traduka:
   a) de alilandaj aŭtoroj
   b) de bulgaraj aŭtoroj
2) Originala literaturo
VI. Esperanto en la lernejoj
VII. Esperanto en la komunikiloj (radio, televido, kino, poŝtaj kaj telekomunikaj ligoj, rimedoj por amasa informado kaj propagando „amasmedia")
VIII. Esperantistaj organizaĵoj kaj movadoj
a) bulgara esperantista movado (laŭ Enciklopedio „Bulgario" de la Sciencakademio de PR Bulgario)
b) aliaj landaj kaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj kaj movadoj
X. Periodaĵoj en Esperanto
XI. Kial ellerni Esperanton?
XII. Bibliografio

Jam tiu strukturo montras, ke la libro estas certe bone uzebla por propagandistoj, kiuj — aparte en Bulgario — volas informi pri la lingvo.

D. B.

Aperos grava libro pri interlingvistiko

La mondfama lingvistika eldonejo Mouton de Gruyter aperigos la titolon „Interlinguistics. Aspects of the science of planned languages" Redaktita de Klaus Schubert (kunlabore kun Dan Maxwell).
Delonge sentiĝas grava manko de lingvoscienca literaturo pri Esperanto kaj aliaj planlingvoj por la ekstermovada scienca fakularo. Jen aperos kolekto da artikoloj kiuj en la angla lingvo prezentos al tia legantaro aktualajn rezultojn kaj vidpuntojn el la vasta gamo de interlingvistikaj esploroj. La volumo „Interlinguistics-aspects of the science of planned languages" turnas sin al tiuj, por kiuj interlingvistiko estas nekonataĵo, sed ĝi samtempe ankaŭ havigas aktualan superrigardon al interesiĝantoj kaj fakuloj de interlingvoj. Ja ekzistas multaj antaŭjuĝoj kontraŭ artefaritaj lingvoj, sed en la epoko de Artefarita Inteligento la trezoro de multjardeka praktika kaj teoria sperto pri artefaritaj lingvoj ekhavas tute novan dimension. La volumo enhavas kontribuaĵojn de interlingvistoj en Eŭropo, Azio kaj Ameriko, kaj ĝi ampleksas larĝan skalon da facetoj. Traktataj aspektoj estas interalie: la komparo de planitaj kaj etnaj lingvoj kun siaj semiotikaj kaj socilingvistikaj implicoj, la interrilato de planlingvoj kaj lingvoplanado, konstruprincipoj kaj natura lingvoevoluo en komunumo de nedenaska lingvo, la ekscia kaj komunika kompetento en planlingvo, literatura esprimivo kaj stilvariebleco, implicoj por universala gramatiko kaj planlingvoj kiel laboratoria ilo por translingvaj esploroj de vortfarado, internacia terminologia normigo, kaj Esperanto kiel lingvo de scioreprezento kaj altnivela semantika kaj pragmatika traktado de signifo en perkomputila tradukado.
La libro enhavas ĉ. 290 paĝojn kaj kostos ĉ. 105 nederl. guldenojn. Tio estas speciala rabata prezo por la Esperanto-movado, je kiu eblas aĉeti la libron nur per la Libroservo de UEA. La prezo en ĝeneralaj librovendejoj estos DM 118,—. La titolo estas mendebla ĉe s-ro Simo Milojeviĉ, Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

Internacia Junulara Semajno — Szolnok, 08—14 de julio 1989

Lingvo-Studio Budapest kaj Hungara Esperanto-Junularo denove invitas vin al la Internacia Junulara Semajno, IJS, alinome neformala antaŭkongreso de IJK (Szolnok, 08-14 de julio, 1989).
Se vi jam partoprenis ĝin en la antaŭaj jaroj, vi scias kio ĝi estas. Se ne, vi sciu, ke karaktero de IJS estas ripoza somerumado en esperantista junulara

medio. La vorton junulara ni interpretas, ke ‚juna estas tiu, kiu sentas sin tia!' En la semajno ni havos gajan, multnacian, ferian etoson kun multaj movadaj kaj malmovadaj programeroj (tradicia balo, folkloro, kinofilmo „Mephisto" kun profesia E-sinkrono, Dinnyeskoncerto, multaj ludoj kaj konkursoj, politika forumo pri Hungario . . . ktp.), kaj ni havos tempon ankaŭ por somerumado, por viziti naĝejon kaj la urbon. La tuto funkcios, kiel malgranda, unusemajna Esperantio. En IJS vi povos renkonti ĉ. 120 esperantistojn el ĉ. 10 — 15 landoj. Tial ke IJS okazas en la semajno tuj antaŭ IJK, ĉe la fino ni organizos komunan karavanan vojaĝon al IJK en Kerkrade. Dum la semajno ni loĝos en ripozejo ĉu en someraj, turistaj dometoj (8 litaj ĉambroj), ĉu en ŝtonaj domoj (2 kaj 4 litoj), ĉu en la propraj tendoj. La partoprenkotizo inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj la programojn. (Komparu niajn malaltajn kotizojn al la kutimaj Esperantiaj prezoj!)

Kategorioj	Partoprenkotizoj ĝis 01. 03. 1989		poste	
	HUF	NLG	HUF	NLG
1. 2 — 4 litaj ĉambroj	3200	180	3600	210
2. Someraj turistaj dometoj	2600	155	3000	185
3. Propraj tendoj	2000	110	2400	140

La kategorioj validas laŭ la dato de la pago!
Rilate al la pagmaniero gejunuloj el GDR kaj Pollando turnu sin al siaj Landaj Sekcioj. Okcidentanoj pagu al UEA, favore al la Konto: ELLS-S. Malfruaj aliĝantoj (post la 15-a de junio) pagu surloke. Grupajn aliĝojn ni akceptas nur post la ricevo de la pago. Pluaj informoj haveblas ĉe Lingvo-Studio (Tel.: +36-1-288258) aŭ ĉe HEJ. La aliĝilojn petu kaj sendu al: LINGVO-STUDIO, Szilvási László, H-1675 Budapest pk. 87, Hungario.

Internaciaj Esperanto-aranĝoj en Hungario en 1989

1. **Internacia Junulara Semajno** (IJS '89): Org.: Junulara Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio. H-1368. Budapest Pk. 193.
   dato: 1989.07.02-08/loko: Szolnok
   prezo: 3.370 Ft
   aliĝdato: 1989.06.05
2. **Internacia Esperanto-Lingvotendaro en Kiliántelep:**
   por bazlernejanoj (LEB), prezo: 3.068 Ft
   por mezlernejanoj (LEM), prezo: 3.990 Ft
   por plenkreskuloj (LEP), prezo: 4.745 Ft
   dato: 1989.07.07-14
   org.: Express, Esperanto-Sekcio. H-1395. Budapest Pk. 567
   aliĝdato: 1989.06.01
3. **Internacia Renkontiĝo Esperanto Naturamika:** (IREN)
   loko: Abaliget/dato: 1989.07.15-24
   org.: Departementa Komitato de HEA en Baranya. H-7602. Pécs Pk. 2
   prezo: 4.410-4.610 Ft
   aliĝdato: 1989.06.15
4. **Somera Esperanto-Lernejo en Eger** I. Por ĉiuj interesiĝantoj (SELE I):
   dato: 1989.08.08-14
   org.: Express, Esperanto-Sekcio. H-1395. Budapest Pk. 567
   prezo: 2.960 Ft
   aliĝdato: 1989.07.01
   Somera Esperanto-Lernejo en Eger II. Por pedagogoj (SELE II):
   dato: 1989.08.15-21
   org.: Express, Esperanto-Sekcio (adr. vidu supre!)
   prezo: 2.960 Ft
   aliĝdato: 1989.07.08

5. **Somera Esperanto-Lernejo en Tata** (SELT):
dato: 1989.08.02-08
org.: Express, Esperanto-Sekcio (adr. vidu supre!)
prezo: 2.960 Ft
aliĝdato: 1989.06.20
6. **Someraj Esperanto-Kursoj en Lingvolaboratorio en Szombathely** (SEKEL):
dato: 1989.08.06-15
org.: Departementa Komitato de HEA en Vas. H-9701. Szombathely. Pk. 45
prezo: 4.150 Ft
aliĝdato: 1989.07.15
7. **Vintra Esperantista Ferio en Budapest** (VEF):
dato: 1989.12.28-1990.01.02
org.: Budapeŝta Komitato de HEA. H-1443. Budapest Pk. 153
prezo: 3.630-3.850 Ft
aliĝdato: 1989.11.20
La prezoj (krom 2.) ne inkluzivas la 15 %-an imposton!

Esperantista Kultura Festivalo en Opava

De la 16a ĝis la 18a de septembro 1988 en la moravia urbeto Opava okazis la VIa Esperantista Kultura Festivalo. Tiu festivalo estis organizita de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La kadron por la aranĝo formis la festsemajno omaĝe al la fama ĉeĥa poeto Petr Bezruĉ, kiu naskiĝis en Opava.
Partoprenis ĉirkaŭ 80 esperantistoj, inter alie gastoj el Hungario, Bulgario kaj el GDR. Ni estis invititaj kiel oficialaj reprezentantoj de GDREA. Sekve dum la solena inaŭguro de la festivalo ni transdonis korajn salutojn de nia asocio. Poste okazis seminario pri „Nacia kulturo kaj la Internacia Lingvo". Por honori la poeton Petr Bezruĉ la partoprenantoj vizitis la tombon, metis florojn kaj aŭskultis poemon de li. Reveninte al la urbocentro ĉiuj esperantistoj ĝojis pri la „Pupteatro en kofro" de Tomáŝ Plaský el Košice, kiu helpe de nur malmultaj objektoj tre lerte esprimis la riĉan agadon de siaj pupoj. La kulminon formis la arta vespero dum kiu sin prezentis kelkaj artistoj de la „serioza muziko", plejparte membroj de Altlernejo de muzaj artoj en Prago. Ni aŭskultis klasikajn kaj modernajn verkojn por arkordeono, por piano kaj violono kaj kelkajn recitadojn. Tre afabla estis la koruso Stěbořice, kiu kantis krom diversnaciaj kantoj ankaŭ kelkajn kantojn en Esperanto. Oni vidas, ke ne estis facile por ni kiel amatoroj, sukcesi apud tiuj artistoj. Tamen nia prezentado de germanaj popolkantoj kantataj en la Internacia Lingvo, rezultigis tre koran aplaŭdon kaj vekis intereson. Je la fino de la vespero ĉiuj amuziĝis ĉe folklora muziko kaj danco.
Taksante tiun festivalon oni devas diri, ke nur malmulte da partoprenintoj aktive prezentis kulturajn kontribuojn. La atmosfero estis tre serioza, ankaŭ pro manko de junularo. Tamen, la festivalo estis tre bone organizita kaj montris la uzadon de Esperanto sur la kultura kampo.

Silke Keiling kaj Dirk Buchholz

Renkontiĝo en Miskolc

De la 18a ĝis la 21a de aŭgusto 1988 en la urbo Miskolc okazis Hungara Tutlanda Esperantista Renkonto, en kiu partoprenis gastoj el sep landoj, i. a. el GDR. La ĉeftemo estis rememoro pri la fondintoj de la loka movado, Kolomano Kalocsay kaj D-ro Lajos Györi Nagy, kiuj antaŭ 75 jaroj diskonigis kaj instruis Esperanton en la urbo. Dum tuttagaj aŭtobusaj ekskursoj oni konatiĝis krome kun fortikaĵoj kaj memorlokoj de la hungara historio en la departemento.

(Laŭ informo de G. Lukács)

La IX-a Internacia Renkontiĝo de Popolaj Orkestroj

Kun ĝojo ni informas, ke altvalorajn rezultojn de la pasintjaraj aranĝoj rimarkis ĉiuj aŭtoritatoj kaj, ke Etnografia Muzeo en Toruń /Pollando/ organizas jam la IX-an INTERNACIAN RENKONTIĜON de POPOLAJ ORKESTROJ kun uzo de Esperanto kiel pontlingvo. La Renkontiĝo daŭros de la 21-a ĝis la 23-a de julio 1989.

La organizantoj invitas originalajn popolajn muzikgrupojn, 2-6 personaj, kiuj prezentas muzikon de sia regiono uzante tipajn karakterizajn instrumentojn. Bone estus, se la muzikgrupon akompanus dancparo aŭ kantistoj. Entute la grupo ne povas esti pli ol 10-persona. Ĉiun grupon devas akompani esperantisto-interpretisto, kiu pere de Esperanto kontaktiĝos kun la organizantoj kaj prezentos la programon de la gvidata grupo en la internacia lingvo.

La programo de la Renkontiĝo antaŭvidas koncertojn de ĉiuj grupoj por 1a premio de publiko, mallongajn surstratajn koncertojn, noktan muzikadon de solistoj, popoldancadon en la etnografia parko, festrenkontiĝon kun Societo de Muzeoamikoj ktp.

En Toruń la organizantoj garantias noktadon kaj manĝigadon de la vespermanĝo la 20-an de julio ĝis la matenmanĝo la 24-an de julio 1989. Krom tio la organizantoj garantias poŝmonon por ĉiu partoprenanto. Vojaĝkostojn la partoprenantoj pagas mem.

Interesiĝantoj bonvolu skribi al: Muzeum Etnograficzne w Toruniu, Wały gen. Sikorskiego 19, 87-100 Toruń, PL

Rennkontiĝo sovetia-vjetnama

Okaze de la monato de Vjetnama-Sovetia Amikeco, delegacio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) konsistanta el la membroj de la Prezidio de ASE Dimitrij Perevalov kaj Anatoli Ionesov, vizitis de la 16-a ĝis la 26-a de novembro 1988 la urbojn Hanojo kaj Hô Chi Minh, laŭ invito de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA). La delegacio de ASE renkontis eminentajn personojn de ambaŭ urboj kaj havis plurajn kontaktojn kun vjetnamaj esperantistoj, kun kiuj ili diskutis i. a. la aktualan staton de la Esperanto-movado en la regiono Azio-Pacifiko. La vjetnamaj esperantistoj rakontis pri sukcesoj en la laboro de VPEA.

Werner Habicht 80-jara

Li estas unu el niaj multflankaj veteranoj el la laborista Esperanto-movado, sen kies partopreno ni ne povas imagi nian Centran Estraron. Dum multaj jaroj aktivulo en la turingia distrikto de LEA. Werner Habicht el Waltershausen kunportis multajn spertojn valorajn por GDREA. Dum pli ol 10 jaroj li estis prezidanto de la Distrikta Estraro Erfurt kaj nun estas ties honora prezidanto. Ne imageble riĉe estas lia memoro el la tempo de la laborista Esperanto-movado.
Nia Werner fariĝos 80-jara, la 20-an de aprilo 1989. Okazo, por danki al li, por gratuli kaj por sendi bondezirojn, kiuj sendube venos el ĉiuj anguloj de la respubliko kaj de la

Centra Estraro de GDREA.

Kurt Güse — 65-jara

Kiam antaŭ kelkaj jaroj Kurt Güse fariĝis prezidanto de la Distrikta Estraro Schwerin, la Centra Estraro estis tre kontenta. Kaj oni povas danki al Kurt Güse tre multon. Dum relative mallonga tempo la distrikta organizajo fariĝis grava konstruelemento de GDREA. Li, ĉiam helpema kaj modesta, efike subtenata ne nur de la kolektivo de la Distrikta Estraro, sed ankaŭ de sia edzino, povas retrorigardi al kelkaj belaj sukcesoj: IMEK IV, regulaj konferencoj, internaciaj renkontiĝoj (tutsemajnaj), evoluanta junulara agado k. m. a. La 14-an de majo 1989 nia Kurt Güse do fariĝis 65-jara. Ni tre kore gratulas kaj bondeziras!

Centra Estraro de GDREA

Nikola Aleksiev 80-jara

Unu el la motoroj de la postmilita Esperanto-movado, la eminenta esperantisto el Bulgario, honora membro de UEA, Nikola Aleksiev el Sofio, fariĝis 80-jara la 29-an de junio 1988. Nikola Aleksiev jam dum la 20-aj/30-aj jaroj estis aktiva en la bulgara laborista Esperanto-movado kaj kunfondis la Bulgaran Laboristan Esperanto-Asocion. Dum la 60-aj kaj 70-aj jaroj Aleksiev estis prezidanto de MEM kaj de Bulgara Esperanto-Movado. Li fariĝis Honora Prezidanto de MEM kaj estas tre aktiva verkisto pri la historio de la sindikata kaj Esperanto-movado. Ofte Nikola Aleksiev vizitis GDR, kie li havas multajn amikojn. La Prezidio de Kulturligo siatempe distingis lin per la Johannes R. Becher Medalo en Oro. Li krome havas la honorinsignon de GDREA. Al la ĉiam freŝa jubileulo GDREA deziras ankoraŭ tre multe da forto kaj sano por plenumi la diversajn planojn.

CE de GDREA

Tibor Sekelj (1912—1988)

La 20an de septembro 1988 forpasis Tibor Sekelj, licenciato, mondfama esplorvojaĝanto, preleganto, publicisto, redaktoro, verkisto, prezidanto de Internacia Geografia Asocio, membro de Akademio de Esperanto, komitatano kaj honora membro de UEA, prezidanto de Esperantlingva Verkista Asocio.

Hungardevena, li loĝis en Jugoslavio kaj Sud-Ameriko, lia esploremo kondukis lin en 80 landojn, kie li kolektadis valoregajn informojn pri naturo kaj homoj.

La Esperanto-movadon li stimulis per sia instruado en pluraj landoj, sia verkista talento kaj sia organizemo.

Tibor Sekelj estis elstara defendanto de la homara kulturo, de paco kaj de Esperanto, kaj ni ĉiam gardos la memoron pri li.

Johannes Palu 75

La konata estona esperantisto, Johannes Palu el Tallinn, fine de majo 1988 fariĝis 75-jara. Li dum multaj jaroj estas peranto de „der esperantist" en Soveta Unio. GDREA tre kore gratulas postfeste.

Forpasis Pavel Rosa

Dum multaj jaroj Pavel Rosa el Bratislava estis prezidanto de la Asocio de Slovakaj Esperantistoj. Li kompilis televidan kurson de Esperanto kaj verkis multajn lernolibrojn. Pavel Rosa forpasis la 28-an de junio 1988.
GDREA kondolencas.

Ni funebras

— pro la forpaso de la konata sovetia esperantisto Nikolaj F. Danovskij, la 2-an de majo 1988 en Riga.

Ni kore gratulas postdate al

— Karl Müller el Potsdam, kiu festis sian 75-an naskiĝtagon la 19-an de novembro 1988
— Arthur Mildner el Pirna, kiu fariĝis 90-jara la 22-an de septembro 1988
— Elli Rühle el Meißen, kiu fariĝis 75-jara, la 9-an de marto 1988
— Erich Seidemann el Dresden, kiu fariĝis 80-jara la 23-an de majo 1988
— Oskar Walter el Zittau, kiu fariĝis 85-jara, la 1-an de decembro 1988.

Rimarko de la redakcio:

Bedaŭrinde ni plej ofte tre malfrue ekscias pri vivjubileoj de niaj nunaj aŭ iamaj aktivuloj. Ni do nepre petas pri multe pli frua informado.

Partoprenu ekspozicion

La Esperanto-klubo de Nové Mesto nad Váhom (ČSSR) deziras aranĝi ekspozicion por varbi urbanojn. Helpu pere de bele afrankitaj bildkartoj aŭ leteroj! Skribu al: MsKS-Esperanto-klubo, Hviezdoslavova 4, 91501 Nové Mesto nad Váhom, ČSSR.

Bonvolu korekti en de 6/88, p. 122

En la parolado de S. M. Gorbaĉov la alineo meze de la paĝo devas ĝuste teksti:
„Necesas solvi la taskojn de la rekonstruo tiel, ke estu maksimume stimulataj iniciatemo kaj memstareco de la homoj, superataj iliaj pasiveco, civitana paleco, apatio, ŝabloneco de la pensmaniero . . ."
Ni petas pardonon pro la elaso de la frazoparto.

La red.

GDR

38 j. programisto dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, arto: Werner Sperling, Liliensteinstr. 38, **Leipzig 7065.**

André Epperlein, Aug.-Bebel-Str. 18/48-03, **Schwarzenberg/Erzg. 9430,** dez. kor. tutmonde pri vojaĝoj, literaturo, forstmastrumado.

Reinhard Messal, **9933 Bad Elster,** E.-Thälmann-Str. 14, PSF 7/39/1109, dez. kor. tutmonde pri elektroniko, komputero, literaturo, E-movado

Evelyn Neumann, **7590 Spremberg,** Waldstr. 25, 44j., dez. kor. kun komencantoj pri muziko, filatelio, turismo

30j. muzikistino dez. kor. tutmonde pri klasika k distra muziko kun muzikspecialistoj, serĉas vortarojn pri muziko k literaturo: Ciobanu Nausica Crenguta, **6800 Saalfeld,** W.-Pieck-Str. 136/414

30j. seruristo dez. kor. pri modelfervojoj, muziko, vojaĝoj: kol. pm: Klaus Riedel, Rosa-Luxemburg-Str. 9, **Finsterwalde 7980**

Hungario

23j. studento dez. kor. kun juna esp. el GDR pri lernado de fremdlingvoj, E-movado; kol. bk pri urboj, pm: Gábor Medveczki, Ibolya u. 9, et. 1, ap. 4, **4027 Debrecen**
4. 2/7

17j. lernanto dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: János Kiss, **6800 Hódmezövásárhely,** Hódtó u. 4.2/7

33j. instruistino dez. kor. kun geesp. el GDR: Baráth Lajosné, Felsöczentián, Szabadság u. 53, **6447**

Kubo

Kuracisto, 38j., dez. kor. pri filatelio, muziko, lingvoj tutmonde: D-ro Reinoldo Pantoja Millau, Maiti 110, apartemento 2, e/Sacoi y C. Figueredo, **Bajamo 85100 Granma**

Nederlando

Anton Blickman, Palamedesstraat 17, **2026 W Haarlem,** 68j., dez. kor, kun bone instruitaj personoj pri papilioj kaj naturaj orkideoj en div. regionoj, folkloro, historio pri la abeloj, tridimensia fotografado.

Soveta Unio

26j. fabriklaboristo dez. kor. pri kulturo, etnografio kaj historio de nordusonaj indianoj: Anatolo Sidorov, **167 007 Siktivkar,** Jeleznodorojna 53/6

Baliulis Valdas, **234 520 Kapsukas,** Traky 11, Litovio, 25j., dez. kor. p. ĉ. t.

42j. elektroteknikistino dez. kor. tutmonde pri kino, muziko, turismo: Ludmila Kostina, **675 006 Amurskaja regiono,** u. Blagovesĉensk, str. Šimanovskaj 5-86

Anoj de Esperanto klubo „Verda kverko", A. d. 50, **235 030 Kedainiai,** Litovio, dez. kor. tutmonde

58j. pensiulo dez. kor. tutmonde: Aleksandr Masjukas, **183 038 Murmansk,** pr. Lenina 101, kv. 26

Jivile Jonuševičiute, J. Janonio 8-22, **235 720 Palanga,** Litovio, dez. kor. tutmonde

Esperanto-grupo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. pm, bk, esperantajojn: Endel Pajula, **202 830 Ambla,** Paide raj., Estonio

23j. komencantino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Jolanta Šlikaite, **235 319 Panevéžys**/Litovio, Grigo 37-502

Tanzanio

Alphone Meshack, **Kisesco,** PO Box 4, Bukene-Tabora, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Turkio

Can Zamur, Fethiye cad. Feyiz ap. No. 32, **34240 Fatih/ist,** dez. kor. tutmonde

Zairio

Lungikisa — Sumbu, BP. 1007, **Kinshasa** instruisto, dez. kor. kun amikoj el GDR, ankaŭ kluboj, lernejoj, kol. pm

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16